

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • (823) 4, julio - aŭgusto 2000

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

LA REDAKTORO BEZONAS TEKSTOJN



Novaj tradukoj de Tesalonikanoj
kaj Filemono
La protestanta familio
Esperanto en estonteco?

KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA**

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi
la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerck
☎ +31 0251 231941; ✉ klooster@abdijkaarsen.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ javadi@worldonline.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€ 15,- ☉ Membro-subtenanto € 22,- ☉ Nura
abono: pagante rekte al KELI € 12,-; pagante
al Libroservo € 14,-. Monsendoj de okcidentaj
monbiletoj per registrita letero al la kasisto de
KELI ☉ Se estas en via lando UEA—poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al
UEA por konto **kelk-p** de KELI ☉Nederlanda
poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340, Nouaillé-
Maupertuis, Francio; ☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@alterm.com.

Manuskriptojn oni sendu nur al la Redaktoro!

Abonprezo sen membreco en KELI: € 12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reproso aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo „HEJME” Kazimierz LEJA

✉ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

- p. 3 Al Filemono
p. 4 Al la Tesalonikanoj I
p. 7 Al la Tesalonikanoj II
Novaj tradukoj de Gerrit BERWELING
- p. 8 **Penseto pri la fino**
La fino de la mondo: kiam, kiel?
- p. 9 **Ĉu komuna Sankta manĝo?**
Ekumenismo?
- p. 10 **La protestantoj kaj la familio**
Protestanta kompreno pri la familio
kaj la para vivo
- p. 16 **Esperanto kaj Esperantistoj**
en estonteco
Ĉu ni pretas por la fina venko?
- p. 18 **Esperanto kaj sporto**
Proponoj por Esperantista agado
en sportaj medioj
- p. 20 **Rezulocio de UNESCO**
pri plurlingveco.

Redaktoraj vortoj

Mi ankoraŭ devas pardonpeti pro prokrasto
de nia revuo. La kaŭzo certe troviĝas ĉe mi. Sed
mi volas tamen aldoni, ke kiam mi ne havas
multe da materialo por konsistigi la numeron,
mi esperoplene atendas artikolojn. Do, mi petas,
ne atendu ke mi atendu. Sendu plej rapide viajn
informojn, komentojn, studojn, rimarkojn al la
redakcio, eĉ mallongajn. Ne forgesu, por la lasta
numero de ĉi tiu jaro mi atendas kontribuojn pri
la temo: *Morto kaj vivo*.

Oni diris al mi, ke per miaj rimarkoj mi
malkuraĝigis kelkajn. Tio kompreneble ne estis
mia intenco. Ĝi estis simple indiki kelkajn
„trukojn” por male kuraĝigi homojn verki
almenaŭ ion. Konsideru tion, kion mi jam diris,
ne kiel devigon, sed simple kiel helpilojn.

Mi jam diris, ke tiu revuo estos tion, kion
vi faros el ĝi.

La kongreso devus provizi tre interesajn
artikolojn por la baldaŭa numero.

Do, ĝis baldaŭ.

Philippe COUSSON

AL FILEMONO

aŭtoroj, adresitoj, saluto

1: 1 Paŭlo, katenulo de Mesio Jesuo, kaj
la frato Timoteo: al nia amata kunlaboranto
Filemono, 2 kaj al Apfia nia fratino, al
Arĥipo nia kunbatalanto, kaj al la eklezio
en via¹ hejmo: 3 gracon al vi kaj pacon
de Dio nia Patro kaj de la Sinjoro Jesuo
Mesio.

dankodiro kaj preĝo

4 Mi dankas mian Dion ĉiam kiam en
miaj preĝoj mi memorigas vin, 5 ĉar mi
aŭdas pri viaj amo kaj fido al la Sinjoro
Jesuo kaj al ĉiuj sanktuloj. 6 La fido kiun
ni havas komune, igu vin kompreni ĉion
bonan, kion por Mesio ni povos fari.² 7 Ĉar
mi spertis multe da ĝojo kaj konsolo el via
amo, frato, kiam la koroj de la sanktuloj
refreŝiĝis dank'al vi.

pledo por Onezimo

8 Tial, kvankam en Mesio mi plenrajte
povus atentigi vin pri via devo, 9 tamen
prefere mi alvokas vian amon. Li kiu
skribas al vi estas Paŭlo, oldulo, krome
nun eĉ katenulo de Mesio Jesuo, 10 kaj mia
peto koncernas la idon kiun enprizone
mi generis, Onezimon, 11 kiu pasee al vi
ne multe utilis,³ sed nun speciale utilas
kaj por vi kaj por mi. 12 Mi resendas lin
al vi, lin t. e. mian koron. 13 Mi miavice
volontege retenus lin ĉi tie, tiel ke, anstataŭ
vi, li povos prizorgi min en mia kaptiteco
pro la bona mesaĝo. 14 Sed mi ne volas ion
fari sen via konsento, por ke via boneco
ne estu devigita sed spontanea. 15 Eble ĉi
tio estis la kialo, ke certan tempon li estis
for de vi: ke nun vi ricevu lin por ĉiam,
16 ne plu kiel sklavon, sed multe pli ol
sklavo: kiel fraton amatan, precipe por mi,
kaj sekve des pli ankaŭ por vi, laŭhome

kaj en la Sinjoro. 17 Se vi sentas vin ligita
al mi, bonvenigu lin do kvazaŭ <li estus>
mi. 18 Kaj se li iom misfaris aŭ se li ion
ŝuldas, metu tion sur mian konton. 19 Jen
mia subskribo: mi Paŭlo, mi pagos... Aŭ
ĉu mi diru: <metu tion sur vian propran
konton,> ĉar vi jam tiom ŝuldas al mi!
20 Jes, frato: lasu min iom profiti de vi,
en la Sinjoro. Trankviligu mian koron en
Mesio.

fino, salutoj, beno

21 Mi skribas ĉi tion plenkofide pri
via bonvolemo; mi certas, ke vi faros pli
ol mi petas. 22 Samtempe preparu por mi
gasteblecon, ĉar mi esperas, ke dank'al viaj
preĝoj baldaŭ mi estos redonita al vi.⁴

23 Brakumas vin Epafras mia kunmal-
liberulo en Mesio Jesuo, 24 kaj Marko,
Aristarĥo, Demaso kaj Luko, miaj kunla-
borantoj.

25 La graco de la Sinjoro Jesuo Mesio
<estu> kun via spirito.

trad. Gerrit BERVELING

¹ Tiu ĉi *Via* estas singularo: do la hejmo de
Filemono.

² Tiu frazo estas ekstreme neklara. La nacilingvaj
tradukoj ege diverĝas. Se nur doni kelkajn ekzem-
plojn: kelkaj tradukas: Mi dezirus ke nia komuna
fido laboru en vi kaj ke vi rekonu ĉion bonan en ni,
kio direktiĝas al Mesio. Aliaj: ...por ke via amemo
<estiganta> el la fido aktiviĝu al Mesio, kiam oni
rekonas ĉion bonan inter ni. Ree aliaj: La fido, en
kiu vi partoprenas, fariĝu aktiva per la kompreno
pri ĉio bona, kion kiel kristanoj ni faras.

³ La nomo signifas: la utila.

⁴ Tiuj ĉi *vijaj* kaj *vi* estas pluralaj.

aŭtoroj, adresitoj, saluto

1: 1 Paŭlo kaj Silvano kaj Timoteo al la eklezio de la Tesalonikanoj, <kiu estas> en Dio la Patro kaj en la Sinjoro Jesuo Mesio: gracon al vi kaj pacon!

dankodiro


2 Ni dankodiras Dion pro vi ĉiuj ĉiufoje kiam ni memorigas vin en niaj preĝoj. Senhalte 3 ni memorigas antaŭ nia Dio kaj Patro pri via agema fido, via senlaca amo kaj via konstanta espero je nia Sinjoro Jesuo Mesio. 4 Ni estas konvinkitaj, gefratoj, ke Dio vin amas kaj <ke Li> elektis vin. 5 Ĉar <ni heroldis> al vi la bonan mesaĝon, ne nur parole sed ankaŭ en forto kaj sankta Spirito kaj en plena konvinkigo. Vi ja mem scias kiel ĉe vi ni klopodadis pro vi.

6 Kaj vi fariĝis imitantoj niaj kaj de l' Sinjoro, kiam la parolon vi akceptis sub multe da elproviĝoj kaj <tamen> ĝojaj en la sankta Spirito. 7 Tiel vi fariĝis ekzemplo por ĉiuj fiduloj en Macedonio kaj Ahajo. 8 Ĉar de vi disvastiĝis la parolo de l' Sinjoro, kaj ne nur tra Macedonio kaj Ahajo, sed ĉie diskonigis via fido je Dio. Pri tio nenion ni plu diru. 9 Ĉar ili mem ja rakontas kia estis nia agado ĉe vi kaj kiel vi konvertiĝis de la idoloj al Dio, por servi la vivantan kaj veran Dion, 10 por el la ĉielo atendi Lian filon, kiun Li relevis el la mortintoj: Jesuon kiu nin savas de l' kolero venonta.

la prediko de Paŭlo inter la Tesalonikanoj

2: 1 Vi ja mem scias, gefratoj, ke nia agado inter vi ne estis vana. 2 Male, post la

mistrakto kaj insultoj kiujn, kiel vi scias, ni suferis en Filipio, per nia Dio ni trovis la kuraĝon por, malgraŭ forta rezisto, paroli ĉe vi la bonan mesaĝon de Dio. 3 Ĉar nia predikado ne devenas el erarado, malpuraj intencoj aŭ trompo. 4 Sed ĉar Dio mem trovis nin taŭgaj kaj konfidis al ni la bonan mesaĝon, tial ni parolas ĝin: ne por ekplaĉi al homoj, sed al Dio, kiu elprovas nian koron. 5 Ja neniam ni okupiĝis pri flatado, tion vi scias, kaj ankaŭ ne pri avaraj kromintencoj: Dio estas nia atestanto. 6 Ni ne serĉis honoron flanke de homoj, nek de vi nek de aliaj, 7 kvankam kiel apostoloj de Mesio ni povus kondukti impone. Sed inter vi ni agis kiel sendefendaj infanoj, kvazaŭ nutristino vartanta siajn etulojn. 8 Tiel kore ni ligiĝis al vi, ke volonte ni donacus al vi ne nur la



bonan mesaĝon de Dio sed ankaŭ nian vivon; tiel karaj vi fariĝis al ni. 9 Vi ja memoras, gefratoj, niajn penadon kaj klopodojn. Ni heroldis ĉe vi la bonan mesaĝon de Dio, tage kaj nokte laborante, sen ĝeni iun inter vi. 10 Kune kun Dio vi povas atesti kiel pie kaj juste kaj senmakule ni kondukis antaŭ vi, la fiduloj. 11 Vi ja scias ke ĉiun el vi unuope — kvazaŭ patro siajn infanojn — 12 ni admonis kaj kuraĝigis kaj ke ni priĉuris vin, ke vi vivu kiel decas antaŭ Dio, kiu vin vokas al sia regno kaj sia gloro.

13 Kaj tial ni do dankas Dion senintermite, ĉar la parolon de Dio, kiun vi aŭdis de ni, vi ricevis kaj akceptis; ne kiel parolon de homoj sed kiel envere ĝi estas: parolo de Dio mem, kiu daŭre agas en vi, la fiduloj.

14 Gefratoj, vi fariĝis imitantoj de l' eklezioj de Dio kiuj estas en Judajo en Mesio Jesuo, ĉar de viaj propraj gentanoj vi suferis la samon kiel ili de la Judajaj, 15 kiuj mortigis la Sinjoron Jesuo kaj la profetojn kaj persekutis nin, — kiuj ne plaĉas al Dio kaj kontraŭas ĉiujn homojn, 16 — kiuj volas malebligi ke ni parolos al la gojoj por ke tiuj saviĝu; kaj tiel ili daŭre plenigadas la mezurilon de siaj pekoj. Sed la kolero <de Dio> ja ankaŭ plenezure venis sur ilin.

la vizito de Timoteo al la Tesalonikanoj

17 Gefratoj, dum certa tempo ni kvazaŭ orfiĝis de vi, de via vizaĝo sed ne de via amo. Grandan penadon ni faris por ree vidi vian vizaĝon; tiel arda estis nia deziro. 18 Tial ni faris planojn por viziti vin; mi mem, Paŭlo eĉ dufoje, sed Satano tion malebligis al ni. 19 Ja kio alia estas nia espero, nia ĝojo, nia venko-krono pri kiu ni fieru, kiam ni staros antaŭ nia Sinjoro Jesuo je ties alveno — kio do, krom vi!? 20 Ja vi estas nia fiero kaj nia ĝojo.

3: 1 Finfine ni ne plu eltenis. Ni decidis postresti en Ateno solaj 2 kaj sendis al vi Timoteon, nian fraton kaj kunlaboranton de Dio ĉe la <predikado de l'> bona mesaĝo de Mesio, por fortigi vin en via fido kaj kuraĝigi vin 3 tiel ke neniu el vi maltrankviliĝu de l' nuna premateco. Ĉar vi mem scias ke tia

sorto atendas nin. 4 Kiam ni estis ĉe vi, ni jam antaŭdiris ke premateco atendas nin; kaj tio plenumiĝis, vi ja scias! 5 Tial do, kiam mi ne plu povis elteni, mi sendis lin al vi por certigi pri via fido, ĉu eble la elprovanto elprovis vin kaj vanis do nia penado.

6 Ĵus alvenis ĉi tie Timoteo: li alportis bonan novaĵon pri via fido kaj amo, kaj ke vi ĉiam ankoraŭ gardas pri ni bonan memoron, kaj same arde sopiras revidi nin kiel ni vin. 7 Tial, ĉe ĉiu nia mizero kaj premateco, ni estas plenigitaj, gefratoj, de konsolo pro via fido. 8 Ni reviviĝas denove, ĉar nun montriĝas ke vi rezistas en la Sinjoro. 9 Kiel ni povos danki Dion sufiĉe pro vi, pro ĉiu ĝojo kiun vi havigas al ni antaŭ nia Dio? 10 Tage kaj nokte ni arde preĝas, ke ni povos revidi vin kaj kompletigi, kio ankoraŭ mankas al via fido. 11 Dio mem, nia Patro, kaj nia Sinjoro Jesuo faru, ke nia vojo atingu vin. 12 Kaj vian amon inter vi reciproke kaj al ĉiuj ĉiam kreskigu la Sinjoro, same kiel ni <amas> vin.¹ 13 Li fortikigu vian koron, tiel ke vi estos senproĉaj kaj sanktaj antaŭ Dio nia Patro, ĉe la alveno de nia Sinjoro Jesuo kun ĉiuj liaj sanktuloj.

vivi kiel plaĉas al Dio

4: 1 Koncerne la ceteron, gefratoj, en la nomo de l' Sinjoro Jesuo ni petas kaj admonas vin, ke ankoraŭ pli fidele ol ĝis nun vi sekvu la tradicion, kiun vi ricevis de ni koncerne vivovojojn plaĉan al Dio. 2 Vi ja konas la preceptojn kiujn ni donis al vi per la Sinjoro Jesuo. 3 Ĉar tio estas la volo de Dio: ke vi sanktigu vin detenante vin de malĉasto. 4 Ĉiu el vi sciu vivi kun sia edzino² en sankteco kaj virto, 5 ne lasante sin kuntreni de l' pasio, kiel la gojoj kiuj ne konas Dion. 6 Neniu ekscesu aŭ maljustu ĉi-rilate al sia frato, ĉar la Sinjoro ĉion ĉi punas, kiel jam antaŭe emfaze ni sciigis al vi. 7 Dio ja ne vokis nin al malpuro sed por sanktigo. 8 Tial, kiu malŝatas ĉi admonojn, ne malŝatas iun homon sed Dion, kiu ja donas al vi Sian sanktan Spiriton.

9 Pri gefrata amo mi ne bezonas skribi al vi. Mem vi lernis de Dio³ ami vin reciproke, 10 kaj tion vi ankaŭ faras, koncerne

ĉiujn gefratojn en tuta Macedonio. Ni nur admonas vin, gefratoj, fari tion des plie. 11 Kaj strebu kviete prizorgi viajn proprajn aferojn kaj propramane perlabori vian vivtenon, kiel ni ordonis al vi. 12 Tiam via konduto inde impresos la eksterulojn, kaj vi dependos de neniu.

vivantoj kaj mortintoj ĉe la alveno de Jesuo

13 Gefratoj, ni ne volas lasi vin sensciaj pri la forpasintoj,⁴ por ke vi ne malĝoju kiel la ceteraj <homoj>, kiuj ne havas esperon. 14 Ĉar se ni kredas, ke Jesuo mortis kaj releviĝis, tiam la forpasintojn en Jesuo kune kun li kunportos Dio. 15 Kaj tion ĉi ni povas sciigi vin laŭ parolo de la Sinjoro: ni kiuj restos vivantaj ĝis la alveno de la Sinjoro,⁵ neniel antaŭiros la forpasintojn. 16 Ĉar kiam la Sinjoro, ĉe la ordono, ĉe la voĉo de l' ĉefanĝelo, ĉe la trumpeto de Dio, descendos de l' ĉielo, tiam unue ekstaros la mortintoj en Mesio. 17 Poste ni, kiuj ankoraŭ vivos, estos forkaptataj kune kun ili surnube traere, ek al la Sinjoro. Kaj tiel ni estos kun la Sinjoro por ĉiam. 18 Konsolu vin do reciproke per ĉi vortoj.

vigiladu

5: 1 Pri tempo kaj horo, gefratoj, ni ne bezonas skribi al vi. 2 Vi ja mem scias tre bone, ke la tago de l' Sinjoro venos kiel ŝtelisto dumnokta. 3 Ĉar dum oni diras: Estas paco kaj sekureco, jen subite atakos ilin la perejo, kiel naskospasmoj la gravedulinon; ne eblos eskapi. 4 Sed vi, gefratoj, vi ne vivas en obskuro, tiel ke la tago trompus vin kiel ŝtelisto. 5 Vi ĉiuj ja estas idoj de la lumo, tagidoj. Ni ne apartenas al nokto kaj obskuro. 6 Ni do ankaŭ ne dormu kiel la ceteraj, sed restu vigilaĵoj kaj sobraj. 7 Ĉar la dormantoj dormas nokte; la ebrüigantoj ebrüiĝas nokte. 8 Ni, taguloj, ni estu sobraj, la bruston kirasitaj per fido kaj amo, la kaskon de l' espero je saviĝo surkape. 9 Ĉar nin Dio ne destinas por <suferi> Lian koleron, sed por partopreni la saviĝon per nia Sinjoro Jesuo Mesio, 10 kiu mortis pro ni, por ke — ĉu vigilaĵoj ĉu dormantaĵoj — ni vivu kun li. 11 Tial do

konsolu vin, subtenadu vin reciproke, — kiel fakte vi jam faras.

ĉiaj konsiloj

12 Ni petas vin, gefratoj, ke vi rekonu tiujn, kiuj laboradas inter vi, — kiuj gvidas vin en la Sinjoro kaj admonas vin, 13 kaj ke pro ilia laboro vi juĝu ilin indaj je pli ol kutima amo. Gardu la pacon inter vi.

14 Ni admonas vin, gefratoj: riproĉu la nenifarulojn, kuraĝigu la etanimulojn, subtenu la malfortajn, paciencu pri ĉiuj. 15 Atentu, ke neniu repagu malbonon per malbono. Strebu ĉiam al kio bonas, inter vi reciproke kaj por ĉiuj <aliaj> homoj. 16 Ĉiam estu ĝojaj. 17 Preĝu senintermite.

18 Danku Dion pro ĉio. Tion deziras Dio de vi en Mesio Jesuo.

19 Ne estingu la Spiriton.

20 Ne malestimu la profetajn donojn.

21 Ĉion elprovnu, retenu, kio bonas.

22 Tenu vin for de ĉiaspeca malbono.

23 La Dio mem de la paco sanktigu vin komplete; spirite, anime kaj korpe vi restu plene sendamaĝaj ĝis la alveno de nia Sinjoro Jesuo Mesio. 24 Kiu vin vokas, estas fidelaj: Li tenos Sian parolon.

saluto kaj beno

25 Gefratoj, preĝu <ankaŭ> por ni. 26 Brakumu ĉiujn gefratojn kun sankta kiso. 27 Mi priĵuras vin je la Sinjoro, ke tiun ĉi leteron vi voĉlegigu al ĉiuj gefratoj.

28 La graco de nia Sinjoro Jesuo Mesio <estu> kun vi.

trad. Gerrit BERVELING

¹ Ne tute klare.

² Laŭlitere la teksto uzas nekutiman metonimion: 'sian ujon'. Kelkaj komentistoj atentigas ke por Greka publiko, la korpo estas la ujo de l' animo.

³ La teksto havas ĉi tie la belan vorton *theodidaktói*, Di-instruitaj.

⁴ La teksto fakte diras eŭfemisme: la ekdormintoj.

⁵ Paŭlo do klare atendas la alvenon de Jesuo dum sia propra vivo.

aŭtoroj, adresitoj, saluto

1: 1 Paŭlo kaj Silvano kaj Timoteo al la eklezio de la Tesalonikanoj, <kiu estas> en Dio nia Patro kaj en la Sinjoro Jesuo Mesio: 2 gracon al vi kaj pacon de Dio la Patro kaj de la Sinjoro Jesuo Mesio.

dankodiro kaj preĝo

3 Gefratoj, Dion ni ĉiam devas danki pro vi. Kaj ne senkiale: via fido ja forte kreskas, kaj ĉiam pli grandigas via amo reciproka. 4 Ni do ankaŭ gloras pri vi en la eklezioj de Dio, ĉar via fido rezistemas sub la persekutado kaj premateco, kiujn vi devas suferi: 5 pruvo, ke la justa juĝo de Dio trovos vin indaj por la regno de Dio, por kiu vi suferas nun. 6 Ĉar estas juste, ke Dio repagas per premateco viajn subpremantojn, 7 kaj ke al vi kune kun ni ripozon Li donas de via premateco, kiam malkaŝiĝos la Sinjoro Jesuo <kaj> el la ĉielo <descendos> kun siaj potencaj anĝeloj 8 *en fajro brulanta. Tiam definitive li punos, kiuj ne rekonas Dion, kaj kiuj ne pretas aŭskulti* la bonan mesaĝon de nia Sinjoro Jesuo. 9 Eterna perejo estos ilia puno, *for de la aspekto de la Sinjoro kaj for de la gloro de lia potenco*, 10 kiam *en tiu tago li venos por esti glorata inter siaj sanktuloj kaj por esti admirata inter ĉiuj fiduloj*. Ĉar ĉe vi nia atestado vere trovis fidon.

11 Tial do ĉiam denove ni preĝas pro vi, ke Dio faru vin indaj je Lia voko kaj ke per Sia potenco Li plenigu ĉiujn viajn bonajn intencojn kaj ĉiun laboron de via fido. 12 *Tiam la nomo de nia Sinjoro Jesuo gloriĝos en vi* — kaj vi en li — per la graco de nia Dio kaj la Sinjoro Jesuo Mesio.

kio antaŭas la alvenon de Jesuo

2: 1 Sed koncerne la alvenon de [nia] Sinjoro Jesuo Mesio kaj koncerne nian reunuiĝon kun li, gefratoj, ni petas vin, 2 ke ne tiel rapide vi konsterniĝu kaj ke vi ne lasu vin perturbi, nek per io spirita, nek per eldiro, nek per letero, kiu kvazaŭ venus de ni, kvazaŭ jam alvenintus la tago de l' Sinjoro. 3 Neniu vin iel ajn mistifiku!

Unue ja devos veni apostazio kaj devos malkaŝiĝi la homo de senleĝeco, la ido de l' perejo, 4 la kontraŭulo, *kiu sin levas super ĉio kio nomiĝas Dio* aŭ ricevas adoron, eĉ tiom ke li *eksidis en la templo de Dio* kaj sin mem prezentos kiel *Dion*. 5 Ĉu vi ne memoras ke, ankoraŭ estante ĉe vi, tion plurfoje mi diris? 6 Vi scias, kio ankoraŭ retenas lin, tiel ke li nur malkaŝos sin kiam estos lia tempo. 7 Ĉar la sekreto de l' senleĝeco jam aktivis. Ankoraŭ nur malaperu, kio malhelpas. 8 Tiam malkaŝiĝos *la senleĝulo*. Kaj la Sinjoro [Jesuo] *mortigos lin per la spiro de sia buŝo* kaj senfortigos lin per la brilo de sia alveno. 9 La alveno de <l' senleĝulo> apogiĝos sur la forto de satano, kun ĉiaspeca potencmontrado, kun falsaj signoj kaj mirakloj, 10 kun ĉiaspeca krima delogado por la pereontoj, ĉar la amon je l' vero kiu povintus savi ilin, ili ne akceptis. 11 Kaj tial Dio sendos al ili forton kiu forlogos ilin ekfidi la mensogon, 12 por ke ĉiuj kondamniĝu, kiuj ne fidas la veron sed preferis la maljuston.

13 Sed ni, gefratoj, *amataj de la Sinjoro*, ni ĉiam denove danku Dion pro vi. Ĉar Dio elektis vin por savi vin kiel unuulojn per la Spirito kiu sanktigas, per via fido je la vero. 14 Al tio Li vokis vin per nia bona mesaĝo, por ke vi akiru la gloron de nia



Pli kaj pli ni aŭdas aŭ legas pri la fino de la mondo. Sendube multaj aŭ forgesas aŭ neniam aŭdis la vortojn de Jesuo. Nu, estas iom da konfuzo ĉar Jesuo parolas pri du tre apartaj epokoj. La ĉapitro 24-a komenciĝas per la disĉiploj parolantaj pri la templo. Tiam, kiam Jesuo respondis, ke „*Ne estos lasita ĉi tie ŝtono sur ŝtono*” (Mat 24:2b), la disĉiploj demandis: „... *kiam tio estos?*...” „... *kio estas la signo de via alesto kaj de la maturiĝo de la mondaĝo?*” (Mat 24:3b, Jesuo donis tre detalitan respondon pri ambaŭ epokoj

►
Sinjoro Jesuo Mesio.

15 Tial, gefratoj, restu firmaj kaj tenu vin ĉe la tradicio, en kiu buŝe kaj skribe ni instruis vin. 16 Nia Sinjoro Jesuo Mesio mem kaj Dio nia Patro, kiu amas nin kaj kiu en Sia graco donis al ni eternan konsolon kaj bonan esperon, kuraĝigu vin kaj fortikigu vin ĉe ĉiu bona laboro kaj ĉe ĉiu bona parolo.

preĝu kaj laboru

3: 1 Krome, gefratoj, preĝu por ni, por ke, same kiel ĉe vi, la parolo de Dio ĉie triumfu 2 kaj ni liberiĝu de la aĉaj kaj fiaj homoj; ĉar ne ĉiuj partoprenas la fidon. 3 Sed fidinda estas la Sinjoro! Li fortikigos vin kaj savos vin de l' malbona. 4 En la Sinjoro ni fidus je vi, ke vi faras kaj farados kion ni ordonas. 5 La Sinjoro direktu viajn korojn al la amo de Dio kaj al la sistemo de Mesio.

6 Ni ordonas al vi, gefratoj, nome de nia Sinjoro Jesuo Mesio, eviti ĉiun fraton kiu vivas senorde kaj ne <vivas> laŭ la tradicio, kiun vi ricevis de ni. 7 Vi ja mem scias, kiel vi imitu nin; ĉe vi ni ne vivis senorde, 8 kaj ni manĝis nenies panon senpage. Sed tage kaj nokte ni laboris, sub multaj penado

samtempe).

Ĉio okazos, sed kelkaj aferoj okazos pli frue ol aliaj.

„... *vi aŭdos pri militoj kaj famoj de militoj*” (24:6). Sendube, nur necesas rigardi aŭ la ekranon aŭ iun ĵurnalon kaj ni tuj lernas pri militoj aŭ famoj de militoj, sed niaj antaŭuloj ankaŭ lernis la saman, eĉ se ne tiel rapide.

„... *estos malsatoj kaj tertremoj en diversaj lokoj*” (24:7b). La antaŭa komento aplikas al

kaj klopodoj, por kaŭzi al neniu elspezojn. 9 Ne, ke tion ni ne rajtus, sed ni volis doni ekzemplon al vi imitindan. 10 Ankaŭ dum nia restado ĉe vi, ni ĉiam prezentis al vi la regulon: kiu ne volas labori, tiu ne manĝu.

11 Ni ja aŭdis, ke kelkaj ĉe vi vivas senorde, okupiĝante pri ĉio, sed nur ne laboras. 12 Je la nomo de l' Sinjoro Jesuo Mesio ni ordonas kaj admonas tiajn <homojn>, ke ili laboru regule kaj perlaboru sian propran panon.

13 Kaj vi, gefratoj: senintermite faru, kio bonas. 14 Se iu ne obeas al nia ordono, ĉi-letere prezentita, tiam vi notu lin, ne plu rilatu kun li; tiam li ekhontos. 15 Sed ne traktu lin kiel malamikon, sed admonu lin kiel fraton.

saluto kaj beno

16 La Sinjoro de la paco donu pacon al vi ĉiam kaj ĉiel. La Sinjoro <estu> kun vi ĉiuj.

17 Ĉi saluton skribas mi, Paŭlo, pro-pramane: jen mia signo en ĉiu letero. Tio estas mia manskribo. 18 La graco de nia Sinjoro Jesuo Mesio estu kun vi ĉiuj.

trad. Gerrit BERVELING

►
ĉi tiu ankaŭ. Fakte, multe pri la venonta fino de la mondo okazas preskaŭ ĉiutage.

Estas nur kelkaj aferoj, kiuj ne okazis.

Ĝis nun la „... *evangelio de la regno estos predikita tra la tuta mondo*” ne estis plenumita (24:14). Ankaŭ ni ne vidis „*la abomenindaĵon de dezerteco...*” (24:15) kaj la suno ne mallumiĝas aŭ la aliaj ĉielajoj ŝanĝiĝas (24:19).

Unu afero kiu ne estas klara pro la intermiksaĵo de epokoj estas, ke „*ĉi tiu generacio ne forpasos ĝis ĉio tio plenumiĝos*” (Mat 24:34). Kio estas „*ĉi tiu generacio*”? Ĉu tiuj, kiuj aŭdis kion li diris? Tio eblas nur se „*ĉio, tio*” signifas (nur) la detruon de la templo, kiu verdire okazis dum 70 p. K. Dua klarigo estas ke „*generacio*” signifas la Juda gento, kiu ne forpasos ĝis la reveno de Jesuo. (Tio estas „*ĉi tiu generacio*” estas tiuj, al kiu Jesuo predikis la evangelion kaj tiuj estas nur Judoj.)

La fino de la ĉapitro 24-a kaj la tuto de la 25-a donas al ni la plej gravan informadon.

Unue, en 24:36, Jesuo avertas ĉiujn, ke „...*pri tiu tago kaj la horo scias neniu, eĉ ne la anĝeloj de la ĉielo, ne la Filo, sed la Patro sola*”. Estas ĉi tiu versiklo kiu certigas, ke 24:34 aplikiĝas nur al parto el tio kion Jesuo diris.

Due, tiuj (la fino de 24-a kaj la tuto de 25-a) kaj la paraboloj konfirmas ke ni estu pretaj, ĉar la fino alvenos subite kaj sen averto (24:37-42).

Plua konfirmo estas en la dua letero de Petro. „*Sed la tago de la Sinjoro venos, kvazaŭ ŝtelisto; en tiu tago la ĉielo forpasos kun muĝa bruego...*”. Bonvolu rimarki ke la fino (ne la komenco) de la mondo estos „*kun muĝa bruego*”. Sendube, la evoluistoj renversis la ordon. Ne tre scienca, ĉu?

La konkludo: ke ni atentu pacience kaj „...*estu pretaj; ĉar en horo, kiam [ni] ne atendas, la Filo de homo venas*”.

Edwin HARLER

Finnoto de la aŭtoro: Estas vere necese, ke vi legu la ĉapitrojn 24 kaj 25 de la Evangelio laŭ Sankta Mateo por kompreni ĉi tiun artikolon. La paraboloj pri la dek virgulinoj,

Ĉu komuna Sankta Manĝo?

Fakuloj pri ekumenismo moderigis esperojn, ke Protestantoj kaj Katolikoj baldaŭ povus havi komunan Sanktan Manĝon. Al la impulso de evangeliataj eklezioj kontraŭstaras la rezerviĝemo de romkatolika flanko, deklaris la Konfesi-Scienca Instituto de la germanaj evangeliataj eklezioj en Bensheim. La perspektivon de monda eklezio kaj la germanajn bezonojn oni povas nur malfacile akordigi, oni diris post vizito de la instituta estro Haustejn (*Haŭstajn*) en Vatikano. La sekretario de la Papa Konsilantaro por la Unueco inter la Kristanoj, episkopo Walter Kasper, akcentis, ke al ĉiu formo de eklezia unueco apartenas la demando pri iaspeca komuneco kun la papo. Evidente la juraj problemoj estas pli grandaj ol la teologiaj. Iaspeca komuneco — tio ja ne anticipu difinas la karakteron de la rilatoj al la episkopo de Romo, kies honora primateco por multaj protestantoj ne plu estas horora penso. Sur loka nivelo, ja multaj delonge ne plu atentis malpermesojn, sed kune iras al la tablo de Jesuo. La demando fariĝas des pli urĝa, ke preskaŭ certe dum la planata komuna „*Kirchentag*” en Berlin post tri jaroj (kombino de la Evangeliataj Ekleziaj Tagoj kaj la Katolikaj Tagoj) se ne la oficialaj organizantoj, tamen certe gravaj grupoj ambaŭ-flanke ne toleros la barilon ĉe la Tablo de la Sinjoro.

Karl Heinz SCHAEFFER
Aalen, Germanujo

kiu komenciĝas en 25:1, kaj pri la talantoj, kiu komenciĝas en 25:14, devas esti reekzamenitaj. Ankaŭ vi trovos, ke la rimarkoj de Jesuo pri la bona kaj malbona servantoj en 24:46 estas ligitaj al la parabolo pri la talantoj. Speciale grava estas la averto de Jesuo [24:4-5]: „...*Gardu vin, ke neniu vin forlogu. Ĉar multaj venos en mia nomo, dirante: Mi estas la Kristo; kaj ili forlogos multajn*”. Estas tre facile forgesi ke ni „*estas la lumo de la mondo*” [Mateo 5:14]; kaj konsilo de Paŭlo [Romanoj 12:2]: „*Kaj ne konformiĝu al ĉi tiu mondo; sed aliformiĝu per renovigado de via menso, por ke vi provu, kio estas la bona kaj aprobinda kaj perfekta volo de Dio*”.

LA PROTESTANTOJ KAJ LA FAMILIO

Tiu ĉi teksto estas adapto de prelego prezentita de mi en interreligia konferenco en Poitiers (Francio). Ĝi estis prezentita apud samlongaj prelegoj de la romkatolika episkopo, de la prezidanto de la islama komunumo, kaj de membro de la juda komunumo en la sama urbo. Ĉiuj tekstoj troveblas franclingve sur la reto <<http://filipo.citeweb.net/interrel/>>.

En ĉi tiu teksto (necese mallonga), mi volas prezenti tion, kio povas esti protestanta aliro, provante sentigi al vi en kio ĉi tiu aliro povas diferencigi el tiu de aliaj religioj aŭ de la reganta en nia okcidenta mondo filozofio.

Post situigo de la kunteksto, mi desegnos portreton de la „ideala” familio por protestantoj, kaj poste sekvos kelkaj protestantaj respondoj al la aktualaj problemoj de la familio en nia socio.

Unua punkto, evidenta por la protestantoj, sed ne necese por la aliaj: protestantismo ne agnoskas homan aŭtoritaton. Estas neniu, kiu povus paroli aŭtoritate en la nomo de protestantismo. Kompetentas ĉiu protestanto por distingi tion, kio estas por kredi kaj por vivi. Evidente, li ne faras tion el la malpleno, el nenio. La supera aŭtoritato, estas unu, restas la Biblio, Malnova kaj Nova Testamento. Ĝi estas Vorto de Dio (Parolo de Dio), kiun ĉiu devas interpreti, sub la lumo de sia fido en la komuneco kun la aliaj. El tio rezultas diverseco de interpretoj, ofte komplementaj, foje kontraŭdiraj. Sed el ĉi komuna sinteno aperas komuna ensemblo, rilatanta al fido, al etiko, al ĉiutaga vivo.

Alia notenda punkto: ne ekzistas laŭvorte

protestanta juro. Ekde la principo de la disigo de la-du regnoj formulita de Martin Luther, la eklezioj, eĉ se ili ofte havas direndajn parolojn, ne pretendas regi la socion. La principo restas tiu de demokratio, kie la decidoj kaj la leĝoj rezultas el konsento. Do, neniu jura statuso de la familio aŭ de la geedziĝo estas formale protestanta.

Cetere, oni devas konstati, ke la familio, baza elemento de la socio ekde la fruaj tempoj, varias en sia formo laŭ la kulturoj, laŭ la lokoj kaj epokoj. Esence ĝi estas socia, etnologia fenomeno, al kiu alfrontiĝis la misiistoj. Kion fari antaŭ familia strukturo, kiu ne korespondis kun tiu, kiun ili pensis la normo? Diversaj respondoj estis adoptitaj.

Se oni volas, tamen, doni karakterizaĉon de la protestanta familio, oni povas trovi unu, kies kutimo multe malfortiĝis. Temas pri la familia Diservo, kiu permesis al protestantismo daŭri en Francio dum la mallumaj periodoj de sia historio, de antaŭ la Nuligo de la Edikto de Nantes ĝis post la Franca Revolucio.

Oni atribuas al protestantismo prudan malvarmecon, el komplete malĝusta bildo de puritanismo. Por la protestantoj, sekseco ne estas malvirto. Ĝi apartenas al la homa kondiĉo. Ĝia loko troviĝas en la formita paro, kaj ne nur cele al reprodukto. En puritana komunumo de Nova Anglio, virino iris por plendi al sia pastoro, kaj poste al la tuta komunumo, ke ŝia edzo neglektis ilian seksan vivon. Kaj la edzo estis ekskludita el la komunumo.

Jen efektiva protestanta karakterizaĉo, konsideri nek fraŭlecon, nek seksan abstinon, kiel situaciojn pli valorajn ol la

stato de edzo kaj edzino. Fraŭleco ne estas protestanta virto.

La antaŭa anekdoto montras ke por protestantoj, la virinoj havas en la familia kaj para vivo egalan rolon kiel tiu de la viro. Egaleco ne signifas similecon, sed egaleco ne estas submetiĝo. Al ĉiu sia loko, kun egalrajteco.

Mi finos tiun ĉi unuan parton per rakonto, kiu aperas al mi esenca en la protestanta pensado, tiu de la adultinta virino en la Evangelioj. Oni alkondukas al Jesuo virinon, surprizitan adultanta. Oni petas lin prononci la kondamnon je ŝtonĉetado. Li petas tiun, kiu estas senpeka, ĉeti la unuan ŝtonon. La pli aĝaj unuaj foriras, kaj poste restas nur Jesuo kaj la virino. Ĉu ili kondamnis vin? Ne. Nu, mi ankaŭ ne kondamnas vin, iru kaj ne plu peku.

Jen do kelkaj protestantaj indikiloj pri la familio.

La familio konstruiĝas ĉirkaŭ centro, viro kaj virino. Ili ligiĝis per engaĝo. Ilia amo ne estas, aŭ ne plu estas, tiu sento kiu prenas vin, kaj kiu povas forlasi vin. Ami: tio ne estas amsopiri, estas ami. Tio ne estas stato kiun oni ricevas, tio estas verbo de agado, de volo, de decido, de



rezolutesco.

Se ne estas protestanta juro, ankaŭ ne estas protestanta geedziĝo. La geedziĝo estas socia, civila. Ne nur en nia epoko, multaj vivas kune ne travivinte iun ajn

ceremonion, nek tradician, nek oficialan. Ĉu ili estas geedzoj? Por kelkaj protestantoj jes. ĉar komuna vivo, kaj seksa vivo, estas jam la marko de reciproka engaĝo. Dividi la tegmenton kaj la liton ne estas malgrave.

Se la rilato de la edzo kun la edzino estas konstruita kiel reciproka engaĝo de amo, de respekto, de espero, same estas pri la rilato kun la infanoj. Ĉiu havas sian rolon por teni por la bono de la aliaj. Ĉiu infano bezonas la ĉeeston de patro, de patrino. Kaj en ĉiu familio de kredantoj, tiuj ĉi rilatoj konstruitaj unuj kun aliaj estas laŭ la bildo de la rilatoj de ĉiu gepatro, poste de ĉiu infano kun lia Dio.

Antaŭ la familiaj problemoj, nuntempaj aŭ tre antikvaj, vi certe komprenis ke, laŭ la protestanta vidpunkto, estas du tipoj de analizoj kaj respondoj: etika, teologia analizo, kaj soci (al) a, civila, civita analizo. Ni rigardu la kazon de la familioj detruitaj, rekombinitaj, foje plurfoje. Etiko kondukas nin aserti la necesan konstantecon de la familia ĉelo, sed, se la vivo estas ne dividebla en paro, la disiĝo estas preferinda. Tiam la rolo de la amikoj, de la komunumo, estas akompani ĉiun. La tiama rolo de la membroj de la antaŭe kunloĝanta familio estas daŭrigi ligojn, la rolojn de patro kaj patrino por la infanoj. Ne temas en la protestanta kompreno pri divorco laŭ komuna interkonsento, kiu lasus al ĉiu la eblecon, kiam la afero ne plu plaĉas, iri por provi aliloken. Sed, ĉar tiel funkcias nia socio, ni devas akcepti ĝiajn viktimojn. La nestabileco de la familioj, se ĝi ne estas ankoraŭ majoritata, restas unu el la problemoj de nia liberala socio; mi pli ĝuste devus diri liberecana, kun foje gravaj konsekvencoj.

Kelkaj preferas eviti oficialan geedziĝon. Aperas, almenaŭ al kelkaj protestantoj,

normale ke la socio agnosku tiun ĉi faktan. Parte, la nova franca leĝa statuso rilatas ankaŭ la parojn ekster la kutima skemo, samseksamajn parojn. Se la protestanta etiko ne agnoskas la samseksaman rilaton kiel legitiman, sed prefere kiel konsekvencon de la homa malpieco, la protestantoj asertas ke la socio ne devas marĝenigi ilin, sed akcepti kaj aŭskulti ilin. Tamen, la protestantoj ne komprenus, en la plimulto, ke infanoj povus esti edukitaj sen havi ĉirkaŭ si patron kaj patrinojn, do de malsamaj seksoj.

Alia kaŭzo de disŝiriĝo de la familioj estas la ekesto de la ekonomia malespero. La bone konata ciklo, necerteco, senlaboreco, divorco, kaj senloĝiĝo, atingas tro multe da personoj, kaj atingas tro multe da infanoj. La konsekvenco de ĉiu politika, ekonomia decido estas ofte tre peza por tiuj, kiuj suferas ĝin, kaj la decidantoj ne sufiĉe kalkulas kun ĝi, se entute ili kalkulas kun ĝi.

Tiu ĉi egoista logiko kondukata de tiutipaj decidoj kondukas ankaŭ ĉies paron, familian vivon rilate al la propraj tujaj personaj avantaĝoj. Individualismo, priskribita kiel unu el la karakterizaĵoj de protestantismo, ne estas egoisma. Ĝi estas engaĝo de la individuo en la socio, en la familio, en la paro. Ĝi konstruas rilatojn laŭ la bildo de la rilato individuo-individuo, kiun ĉiu kredanto konstruas kun sia Dio. Ne temas ekhavi sian plezuron, kaj poste iri aliloken kiam ne plu taŭgas. Temas pri firma konstruado, kun aliaj, kun la aliaj, por la aliaj.

Sed, estas alia punkto, sur kiu apogas sin la protestantoj, la graco, la ebleco rekomenci post malsukceso. La nova ekiro ĉiam eblas. Ĝi estas tiam samtempe promeso kaj engaĝo, promeso kaj engaĝo al nova vivo, apogita sur dia promeso.

Philippe COUSSON

AL JESUO

Okazis en la tempo de la vojaĝoj al Luno.
Ene de la ĉaro de la tempo mi estis ekiranta supren al la pinto kun fontoj.
Unue oni ŝtelis miajn ĉevalojn.
Tiam jugiĝis sola.
Poste — la vojoj.
Ĉiuj vojoj.
... kaj sola.

Sed mi rezignis je la penso,
Ke mi eskapis de rabistaj bandoj atendantaj ĉe vojkruciĝoj.
Per la plugiloj de la koro,
Mi konstruis novajn vojojn,
trans florantaj pomĝardenoj,
kaj trans vinberoj
aŭ trans oraj grenoj de tritikoj,
odorante printempan venton.
Subite, rompiĝis miaj kruroj
kaj ili profunde fiksiĝis
en la grundon,
kiel radikoj, rekte en la teron.

Mi sentis, kiel mi fariĝis
vinberbranĉo,
kun ĝia fluido pulsanta
de mil jaroj,
kaj kiam mi jam iom revenis,
ĉiuj fontoj en min translokiĝis.

Doina Burzo
Cluj-Napoca, RU
tirita el „Bazaro”, vintro 1999

HIMNOJ SUR LA RETO



„Cent Himnoj” estis la titolo de himna tekstaro de pastoro Rosbach antaŭ pli ol 30 jaroj. Bedaŭrinde mi ne plu posedas ekzempleron. Sed hodiaŭ mia rethimnaro, ttt-Himnaro Cigneta, ekhavis tiom da tekstoj.



100 tekstoj, el kiuj 79 estas en Esperanto, 12 en la angla, kaj po unu en la lingvoj franca, hispana, hurona, dakota, jida, vjetnama, latina, skotgaela kaj nederlanda.

Kaj ĉiun akompanas taŭga midi-o. Mi gratulas min. La grava anglalingva ttt-ejo pri Kristnasko, „Kir-Shalom”, ĵus informis min, ke estas ligo al mia hurona teksto el Kir-Shalom. Eventuale tio logos kelkajn neordinarulojn al Esperanto... (Kir-Shalom estas kanada, kaj la hurona karolo estis la unua kanada kristnaska kanto; tial oni rimarkis mian ejon)

<<http://www.geocities.com/cigneto/thctxt/dx/estennial1.html>>

Liland B. ROSS

GRESILLON I- A ETAĜO REE FUNKCIAS OFICIALE

Estimataj,

la unua etaĝo de la kastelo estas oficiale loĝebla, danke al la financa helpo de ĉiuj mondonacintoj kaj al la senlaca laboro de skipo de bonvolemluloj. Tiel, en nuna somero 2000, jam eblas loĝi en la kastelo.

Tamen, la dua etaĝo restas neuzebla ĝis plenumo de aliaj laboroj postulataj de komisionoj pri sekureco. Ankaŭ la kuirejo bezonas prilaborojn por esti laŭleĝe uzebla.

Por realigi tiujn laborojn necesajn por plena reaktivigo de la Kulturdomo, Grésillon plu bezonas financan subtenon de ĉiuj bonvolemaj esperantistoj, per sendo de ĉekoj al la adreso de la kulturdomo (Kastelo Grésillon, F-49150 Baygé, Francio) aŭ per ĝiro al la UEA-konto gres-y.

Bonvolu diskonigi tiun informon, antaŭan dankon.

Henri BOYET
Interredaktore



Antaŭ pli ol jaro kaj denove lastatempe mi plendis al la eldonejo de „Ethnologue”, grava informfonto pri lingvoj, ke ĝi ne inkluzivas Esperanton. Mi ĵus ricevis la jenan respondon (traduko):

„Estimata,

Vi pravus, ke Esperanto devintus esti listigita ĉe la mondaj lingvoj. Ĝi jam estas registrita en nia datumbanko, kaj aperos en nia sekvamonte publikigota 14-eldono.

Ray GORDON, Oficejo de Ethnologue”

Do post kelkaj semajnoj, haveblos nova eldono kun almenaŭ iom da informo pri

Esperanto. Pli bone malfrue ol neniam, mi supozas.

La retpaĝejo de Ethnologue troviĝas ĉe: <<http://www.sil.org/ethnologue/>>

D. Gary GRADY
Durham NC USA

(Mi aldonu, ke mi forte dubas, ke mia persona plendo instigis ilin aldoni la lingvon al la libro. Sed tiaj plendoj, se sufiĉe ĝentilaj kaj helpemaj, almenaŭ ne malhelpas.)

Interredaktore

ZEO-J EN GLIWICE

Laŭ la decido de la Urba Konsilantaro en Gliwice, post la propono de loka Filio de PEA, la 29-an de junio 2000 oni decidis nomi du novajn stratojn en la kvartalo „Pac-defendantoj” per la nomoj:

* Antoni GRABOWSKI

* Odo BUJWID.

Post la ekzistantaj ĝis nun jam du Esperantaj stratoj: str. L. Zamenhof kaj str. Esperantystów (de Esperantistoj). Gliwice estas laŭ niaj informoj la unua en la mondo urbo kiu havas kvar stratojn ligitajn kun Esperantomovado aŭ esperantistoj.

Antoni GRABOWSKI (1857- 1921)

En la Esperanta mondo konata kiel „patro de Esperanta poezio”. Laŭ la Esperantaj historiistoj inter GRABOWSKI kaj ZAMENHOF okazis la unua interparolo en Esperanto en la jaro 1887. Granda poligloto. Lia traduko de „Sinjoro Tadeo” el pola lingvo laŭ spertuloj estas perfekta. Li tradukis ankaŭ verkojn de PUŜKIN, GOETHE, SIENKIEWICZ, PRUS, FREDRO kaj aliaj.

Fama sciencisto-kemiisto. Ekde 1908 prezidanto de Pola E-Societo kaj ano de la Akademio de Esperanto.

Odo BUJWID (1857- 1942)

Kuracisto. Bakteriologo. Profesoro de Jagiellona Universitato en Krakovo. Pioniro en Pollando de vakcinoj kontraŭ rabio. Li fondis en Krakovo Pasteur-an Instituton.

En la jaro 1912 li estis prezidanto de LKKo por la VIII-a UKo en Krakovo. Post la I-a mondmilito estis elektita kiel prezidanto de Tutpollanda Federacio de E-organizajoj. En la jaro 1931 denove prezidis de LKK-o por la XXIII-a UKo en Krakovo. Dediĉis multe da tempo por sociaj laboroj.

Vojaĝis ofte pro sciencaj aferoj. Ĉie kontaktiĝis kun esperantistoj. Unu el la plej konataj polaj esperantistoj. Honora membro de UEA.

Vi povas sendi Viajn gratulojn al urbaj instancoj rete al:

<biuro_prasowe@um.gliwice.pl>,

aŭ per poŝto al:

Zarząd Miasta, str. Zwycięstwa 21, PL 44-100 Gliwice Pollando.

Stanisław MANDRAK
<staman@ka.onet.pl>

Interredaktore

INTERNACIA ESPERANTO INSTITUTO 70-JARA

La 24-an de majo 1930 Andreo CSEH kune kun gesinjoroj ISBRUCKER fondis la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto en Nederlando.

Tiam la celoj de la Insitudo estis vortigitaj tiel „disvastigi Esperanton pere de Cseh-metodaj kursoj, prepari taŭgajn instruantojn, helpi ilin kaj la kursarangantajn Esperantistajn organizaĵojn per la necesa instrumaterialo kaj konsilado”.

La unua Direkcio estis plenumita de Andreo CSEH mem kaj de Julia ISBRUCKER kaj ĝi havis konsilantaron

kiu konsistanta el gravaj personecoj de la tiama Esperantio, kiel Edmond PRIVAT, Felix kaj Leono ZAMENHOF, ktp, kaj estis samtempe starigitaj sekretariejoj en Estonio, Hungario, Latvio, Nederlando, Norvegio kaj Svedio.

La unua agado de la Instituto estis organizi Pedagogian Seminarion, kiun ĉeestis 200 personoj el 20 landoj kaj fine de ĝi la grupo karavane vojaĝis al la UK en Oksfordo.

Andreo CSEH disvastigis la metodon, kiu poste famiĝis en la Esperanto-medio per la nomo de ties iniciatinto. En la 30-aj jaroj la Insitudo kalkulis je aro da 300 diplomitaj Cseh-instruistoj, kiuj vojaĝadis instruante la lingvon: Julio BAGHY, Lidja ZAMENHOF, Erika kaj Henrik SEPPIK, Lizzie kaj Tiberiu MORARIU, Carl STØP-BOWITZ, kaj multaj aliaj.

En decembro de 1933 la Instituto akiris sian propran sidejon en la urbo Den Haag kaj ĝis hodiaŭ ĝi funkcias en la sama loko. La inaŭguron ĉeestis lokaj gravuloj kiel la skabeno pri instruado en Den Haag, reprezentanto de la nederlanda ministro pri instruado, ktp.

De la jaro 1952 la Instituto ŝanĝis sian nomon al Internacia Esperanto-Instituto (IEI).

Jam pasis 70 jaroj de vivo de IEI. En tiu periodo ĝi abunde agis en diversaj kampoj. Certe la Cseh-metodo estas la plej konata metodo en Esperantio. IEI nuntempe kalkulas je diplomitaj Cseh-instruistoj en 5 kontinentoj kaj ili prizorgas la vivantecon kaj aktualan uzon de la metodo.

En la eldona kampo IEI montriĝis jam de tiuj fruaj jaroj kun eldonaĵoj kiaj „La libro-

konstantaĵo de fila pieco” aŭ „Karlo”, „La lernolibro de la vivo”, „La centa simio”, „La alia pasinteco”, ktp. Certe la plej gravaj estas la verko „Baza Cseh-Kurso”, unuafoje eldonita en tiu frua periodo kaj kiu jam atingis sian 8-an eldonon; la alia elstara aperintaĵo estas la instrufilmo kun ties apoga materialo „Mazi en Gondolando” lanĉita okaze de la centjara datreveno de Andreo CSEH en 1995. Inda je mencio estas ankaŭ la aperado

de la revuo „La Praktiko”, kiu dum jaroj estis la ĉefa ligilo por la Cseh-instruistoj kaj taŭga lernomaterialo por la lernantoj en la Cseh-kursoj.

IEI daŭre organizas kursojn por lerni la lingvon kaj metodikajn seminariojn por eduki novajn instruistojn en la uzado de la rekta metodo. Ĉiujare deko da Seminarioj okazas en la mondo, kie la instruistaro povas ricevi tiun fakan scion. IEI ankaŭ okazigas specialan trejnadon por gvidi Seminariojn pri Cseh-metodo.

Atilio ORELLANA ROJAS



ESPERANTO KAJ ESPERANTISTOJ EN ESTONTECO

Mi ĵus legis artikolojn en esperantaj gazetoj, nome „*Ĉu Esperanto gardas malfortajn lingvojn?*” de Bård Hekland, en **Norvega Esperantisto** 3, 2000, kaj „*Kial ni ne parolas en Esperanto?*” de N. Gregory MANKIW, en **Heroldo de Esperanto**, 1987, 25 junio 2000. Ili pritraktas aspekton de temo, al kiu mi jam aludis en artikoleto en **Dia Regno**, mi ne plu retrovis kiam, nome: ĉu la Esperantistoj estas pretaj al „sukceso” de Esperanto?

La demando de Bård HEKLAND estas: „Ĉu Esperanto pli ol la angla nune permesus konservado de la uzo de malfortaj lingvoj, kiel la norvega?” Tiu de N. Gregory MANKIW estas „Ĉu eblas ke Esperanto eniros la ciklorezonadon, kiu logas al jama sukceso?”

Tiuj interesaj demandoj instigis min verki denove pri la temo. Mi provos analizi la nunan uzon de Esperanto, poste la nunan staton de la Esperantistoj, kaj de la Esperantistaro. Mi rigardos tiam la eblaj konsekvencoj de pli ampleksa uzo de Esperanto, ĝis „fina venko”. Kaj mia lasta demando estos: „Ĉu ni estas pretaj?”

Nuna uzo de Esperanto

Certe, homoj ĉirkaŭ la tero uzas Esperanton. Por kio ili tiun lingvon uzas? Kiamaniere estas disvastigata la uzo de Esperanto? Esperanto ne estante la lingvo de iu loka komunumo, krom de kelkaj unuopaj familioj, ne estas uzata kiel ĉiutaga parolata lingvo. La lingvo estas ĉefe uzata en kongresoj, en gazetoj, en korespondado, dum vojaĝoj, en literaturo, kaj ankaŭ kun kelkaj teknikaj aspektoj. Krom en kongresoj, kaj por akceptado de vojaĝantoj, la lingvo aperas plej ofte sub skriba formo. La gazetoj plej ofte rilatas al interna

informo, al movada vivo, kaj ankaŭ al teorio pri la lingvo aŭ la movado. Tamen, ekzistas kelkaj publikaĵoj, libroj aŭ revuoj, kiu laboras sur faka kampo, do ne pri Esperanto sed per Esperanto. Ekzistas Esperanta literaturo, tio signifas, ke ekzistas aŭtoroj kaj tradukistoj, kiuj elektis ĉi tiun lingvon por sin esprimi. Ĉu inter ili multas la talentoj kaj geniuloj, mi ne kapablas prijuĝi. Sed tiu literaturo ekzistas. Kaj homoj legas ĝin. Ĉu sekve de kongresoj, ĉu de alia maniero, personaj rilatoj establiĝis, kiuj kreas kaj daŭrigas fluon da korespondado en Esperanto kaj da vizitoj de unu lando al alia. Mi forgesis ankaŭ la aŭskultadon de la kelkaj radioelsendoj.

Mi povus fari la demandon en alia maniero: Kie ne estas uzata Esperanton? En la grandaj „seriozaj” konferencoj kaj kongresoj, sciencaj kaj ekonomiaj, en la „vera” scienca publikado. En tiuj sferoj funkcias la angla, ĉu kontentige, tio estas demando valida, sed la sistemo plu daŭras. Saman forlasan sorton konas diversaj lingvoj, kiel la franca.

Nuna stato de la Esperantistoj

Mi ne kapablas statistiki pri la elementoj, kiujn mi aludos, tio povus esti tasko de doktoriĝanta studento.

Esperantistoj, krom malmultegaj, ne naskiĝas esperantistoj. Ili esperantistiĝas. Kial do oni lernas Esperanton. Lernado de fremda lingvo ŝuldiĝas ĝenerale al kelkaj kaŭzoj: devigo, ekzemple en lernejo, kaj ekonomia espero, ekzemple por dungigo. La kaŭzoj por lernado de Esperanto estas aliaj, kvankam oni povas lerni aliajn lingvojn por la samaj kaŭzoj kiuj lernigas Esperanton. Oni do lernas Esperanton

▶ pro idealismo, pro la „interna ideo”, por paco, por homa interkompreno. Aliaj lernas la lingvon ĉar ili interesiĝas pri lingvoj ĝenerale, do ankaŭ pri tiu „artefarita”. Ofte inverse la lernado de Esperanto kondukas al intereso pri lingvoj pli ĝenerale. Foje ankaŭ la praktikeco de Esperanto por kontakto al tuta fasko da kulturoj helpas en la eklernado. Ĉar oni ekkonis iun, kiu parolis Esperanton, kaj oni volis paroli kun tiu, oni ankaŭ foje lernas la lingvon.

Sed inverse mi dubas ĉu multas tiuj, kiuj lernis la lingvon pro ekonomiaj celoj. Kaj eĉ se tio validas, estus interese scii kiom da ili kabeis aŭ ne kabeis.

Inter Esperantistoj, estas ankaŭ alia klasifiko farebla, nome la lingvo-nivelo. Ni ĉiuj konas tiujn, kiujn oni nomas la „eternaj komencantoj”. Ni eĉ foje renkontas entuziasmajn tiujn en kongresoj. Sed oni ankaŭ hezitas montrofenestri ilin pro timo de malbona bildo de la lingvo kiun ili povus kaŭzi. Tamen pli multnombraj (ĉu vere?) evoluis al meza nivelo, kapablaj profiti kongreson aŭ legadon. Feliĉe troviĝas ankaŭ bonnivelaj esperantistoj, eĉ kelkaj tiaj post nur kelkmonata lernado. Kaj pri ili ni fieras. Ĉu ne? Kaj krome troviĝas ankaŭ tamen kelkaj vere kapablaj instrui la lingvon. Kaj mi ne parolas pri la verkistoj, akademianoj, ktp.

Alia karakterizo estas la partopreno en la movado. En Esperantujo, oni kongresas, sed tio kostas. Oni legas revuojn, sed same. Oni staĝas, sed same. Oni vojaĝas, ankaŭ tio kostas. Oni korespondas, malpli kosta afero. Oni ankaŭ partoprenas en loka klubo, kiam ĝi ekzistas. Sed, krom kelkaj personoj, kiel la verkistoj aŭ la redaktoroj, oni ne ofte uzas la lingvon.

Mi devas konfesi ke ankaŭ kiam temas pri la „alia” internacia lingvo, nome la angla, ne multaj bone scipovas ĝin, kaj krome malofte uzas ĝin (krom en kelkaj landoj

kie la televidfilmoj estas kun anglalingva sono).

Dum tiuj kelkaj pasintaj jar (dek) oj, oni ankaŭ emis klasifiki la Esperantistojn laŭ ilia „eskatologio”. Mi klarigas. Troviĝas tiuj kiuj strebas plenforte al oficiala agnosko de Esperanto kiel oficiala interreta lingvo. Kelkaj nomas ilin „finvenkistoj”. Aliaj iom malpli idealisme kontentiĝus je agnosko de Esperanto kiel funkcia ebla interreta lingvo, ili ĝenerale uzas Esperanton ankaŭ etskale en faka komunikado. Kaj ankaŭ troviĝas tiuj, kiuj konstatis ke Esperanto funkcias en si mem, portas kulturon, kaj volas pluvivigi tiun kulturon en la nuna situacio de disaporo. Oni nomas ilin „raŭmistoj”.

Anoj de la „grandaj lingvoj” vivas ion alian. La fremduloj, kiuj alvenas al ili lernis ilian lingvon. Speciale la anglalingvanoj ne plu havas eskatologion lingvan. Kiam la franclingvaj instancoj timas katastrofon...

Al pli ampleksa uzo

Eĉ la „ne-finvenkistoj” sopiras almenaŭ iomete al pli vasta uzo de Esperanto. Sed al kiu grado de adopto ili pretas kaj sopiras? Aŭ timas?

La akcepto povas esti iompostioma. Do bone, estos tempo alkutimiĝi. Kaj akcepti la novulojn en la movadon. Kaj integri ilin.

Tamen, kelkaj malpacientiĝus. Ili volus gloran subitan oficialan akcepton. Ĉu ili revas pri monumentoj al la pra-esperantistoj, nomè ili?

Se la akcepto, sendepende de la rapideco, estas tutmonda, ĝenerala, tio povas esti bona. Sed la akcepto povas veni de unu fako, aŭ de unu lando (aŭ regiono), aŭ de unu ekzemple religio. Tiam estas risko asimili la lingvon al la nova akceptanto. La Esperanta historio jam konis ĉi tiun situacion landskale, en Brazilo kun la spiritistoj aŭ en Irano kun la bahaanoj. La movado devis barakti por malkonstrui tiun ŝajnan ligan.

Per „sana menso en sana korpo” Leo LENTAIGNE notis la rubrikon SPORTO de sia libro „KIEL DIRI...” Ĉu prave? Eble PIV ŝatus ion diri per sia klarigo de la vorto SPORTO: „Ĉiu el la korpaj ekzercoj aŭ ludoj, celantaj ne sole la amuzon, sed ankaŭ la disvolvon de la lerteco kaj forto fizikaj kaj de la energio, obstino kaj decidemo”. Leo ne malpravis; ĉiu homo bezonas sporton, kaj tion ĉi ĉiu konscie aŭ senkonscie faras. Kie ajn estas la homo, tie ĝi devas zorgi, ke sporto ne manku. Tial ankaŭ ni Esperantistoj ne forgesu Sporton.

► Kiel estus la situacio de la Esperanta kulturo (interna ideo, literaturo, kongresoj, ktp) post tiu akcepto amasa. Simple rememoru la situacion de la Eklezio post la oficialigo de la kristana religio en la romia imperio.

Ĉu ni estas pretaj?

Mi do alvenas al mia lasta, kaj ĉefa, demando: Ĉu ni estas pretaj?

Ĉu ni estas pretaj je persona nivelo? Je movada nivelo? Je kultura nivelo? Ktp.

Rilate al la bezonata eldonado, mi ne havas timon. Oficialigo kaŭzus bezonon, kiun la entrepenoj tuj plenumus.

Instruado estus tute alia problemo. Ĉu ekzistas sufiĉe da lertaj instruistoj por „amase” instrui la lingvon? Aŭ pli ĝuste kaj strategie por trejni instruistojn? Mi forte dubas pri tio. Eble tamen la universitatoj kiuj instruas la lingvon kapablas tion fari. Ĉu en sufiĉa kvanto?

Kiam kristanismo fariĝis oficiala, la parodoj devis ricevi amason da homoj por

Esperanto arigas nin ĉirkaŭ la sama idealo. Tien ĉi ni devas kunporti ĉiujn niajn okupojn, kiujn ni prizorgas en la vasta mondo, trovi taŭgajn vortojn por priskribi ilin, kaj klopodi helpi, ke ni plibonigu ilin. Disciplino sporta okazas en Sudafriko, la samo povas okazi en Nepalo, sed sen Esperanto, ĉu Sudafriko povas facile interparoli kun Nepalano pri la sama afero. Esperanto jam malfermas multajn pordojn al ni; kial ni ne uzu ilin? Ni utiligu la internacian lingvon por plibonigi niajn talentojn sportajn kaj samtempe ni

katekizi. Veraj konvertiĝoj?

Alia parto de mia demando rilatas al la movado. Por kiu celo daŭre vivi kaj agadi. Akademio, certe kaj necese, sed kun kiu pezo? (Ja ne ekzistas akademio de la angla) Fakaj asocioj, eble, almenaŭ por terminologio kaj sperto. Kiu tiam povus esti la rolo de UEA? Ĉu ili jam pripensis la aferon? Mi forte esperas ke jes, eĉ se la probableco de tia „fina venko” aperas al mi kiel fora espero.

Mi ankaŭ esperas, ke la verkistoj kaj literaturistoj ankaŭ pripensis la aferon. Mi ne multe legas la Esperantan literaturon, sed mi ne memoras ĉu ekzistas verko kiu aludas tian situacion.

La sama demando valoras ankaŭ por ni, kristanaj esperantistoj? Ĉu ni estus pretaj, se Romo aŭ Genevo agnoskus iagrade Esperanton? Ĉu ni kapablas pensi niajn ligojn multe pli grandskale? Aŭ ĉu ni restas ĉe nia pasinteco, kiel iama ora epoko?

Ĉu ni plu esperas pri Esperanto?

Philippe COUSSON

disvastigu Esperanton. Kiel tio ĉi eblas?

„Disvastigi Esperanton inter samfakuloj, kaj la fakon inter esperantistoj aŭ informi la Esperantistojn pri la fako”. Tio ĉi precipas en la celoj de la fakaj asocioj de UEA. Eble, se fakasocio de sporto ekzistus, similan celon ĝi havus. Jam pli ol unu jaron mi cerbumas pri kiel Esperanto kaj Sporto povas kunloĝi, ke ambaŭ helpu



al la homaro. Vere, ĝis nun mi ne jam atingis ion. Tial mi turnas min al ĉiuj vi, gesamideanoj, ke ni pripensu la aferon.

Certe ĉiu el vi iamaniere sportas. Du homoj povas diri: „mi sportas”, sed kiam oni vidas ilin, oni rimarkos, ke

kvankam ĉiu sportas, ambaŭ faras ne la saman sporton. Klare, estas multaj disciplinoj sportaj. Kelkaj estas: naĝo, remo, skermo, alpinismo, marŝado, futbalo, bokso, handbalo, volejbalo, rugbeo, basketbalo, skiado, halterado, teniso, diversaj ludoj (goo, ŝako, karto, damo...), ktp. Tiuj ĉi sportoj kaj ludoj estas internacie konataj, kaj tial facile ni povas citi ilin. Ekzistas aliaj, kiuj tute estas lokaj, kiuj povas havi ekvivalenton en aliaj lokoj, kaj kiuj ne estas ĉi tie cititaj. Certe la legantoj de tiu ĉiu teksto kunhelpu, alcitante sportojn siamediajn. Nun kion la Esperantistoj faros por tiuj sportaj disciplinoj?

La unua tasko de la Esperantistoj estas VARBI NOVAJN. Tial la Esperantistoj-sportistoj klopodu, ke nia lingvo havu pli da adeptoj. Kiel tio eblas? Tiun ĉi demandon mi miamaniere respondu: — Faru, ke pli da homoj (Esperantistoj aŭ ne) pere de Esperanto, interesiĝu pri sporto. Por mi tute ne gravas la alia flanko: „fari, ke

pere de sporto pli da homoj interesiĝu pri Esperanto”, ĉar la realigado de la unua aŭtomate efektiviĝos la duan. Granda tasko nun atendas nin, Esperantistojn-sportistojn profesiajn aŭ amatorajn.

Ni perfektigu niajn sciojn Esperantajn kaj sportpratikajn. Tial ni povas facile uzi ambaŭ por helpi al la homaro. Ni pliriĉigu Esperanton: ekzistas disciplinoj sportaj ege lokaj; tiujn ĉi ni pere de Esperanto eksportu; ni tial bezonas specialajn terminojn, kaj jen novaj vortoj naskiĝos. Tute alia flanko de la afero estas la perlaboro de la sportaj fakoj. Nun sportfakoj estas pli ol malhobioj. Homoj freneze riciĝas per ili. Ĉu ni Esperantistoj-Sportistoj ne povas ion fari tiutere? Kaj ni ne forgesu niajn Esperanto-renkontiĝojn!

Neniu neas, ke nun multaj homoj interesiĝas pri sporto. Ĉu disciplinoj sportaj ne povas altiri pli da homoj al niaj Esperanto-renkontiĝoj? Ni pripensu, kiel ni povas organizi diversajn ludojn dum tiuj renkontiĝoj, ke tiuj ĉi havu pli da partoprenantoj.

La Esperanto-laboro senfine pligrandiĝas. Tamen ni faru ĝin, ĉu ne? Nun kune ni vidu, kiel ni povas uzi la sportajn disciplinojn por efektiviĝi la Esperanto-laboron.

Certe estas atendataj viaj vortoj pri la temo.

Gbeglo KOFFI
B.P.13169,Lome,TOGO
rete:<esp.togo@cafe.tg>
Interredaktore



REZOLUCIO DE UNESKO PRI PLURLINGVECO

*Karaj geamikoj,
la ĉi-suba rezolucio estis voĉdonita de
la 30-a Ĝenerala Konferenco de UNESCO
okazinta en oktobro-novembro pasintjare.*

*Ĝi ne rilatas al Esperanto sed al plur-
lingveco. Almenaŭ en la landoj de la
proponintaj kaj apogintaj delegitaroj,
ĝi povus esti utile montrebla al instruaj
instancoj kaj individuoj, kiujn oni volas
konvinki apogi la instruadon de Esperanto.*

Amike

Renato CORSETTI

**Dokumento 30c/Dr 95 Amendo al
Projekto pri programo kaj buĝeto por
2000–2001 (30C/5) prezentita de Belizo,
Benino, Ĉilio, Demokratia Respubliko
de Kongo, Dominika Respubliko,
Ekvadora Gvineo, Gvatemalo, Haitio,
Kazaĥujo, Kubo, Litovujo, Panamo,
Ruando, San-Marino, Sejĉeloj,
Slovakujo kaj Tajlando. Apogita de
Belgujo, Ekvadoro, Peruo kaj
Vjetnamujo**

12. Starigo de tutmonda lingvo- politiko bazita sur plurlingvismo

La ĝenerala Konferenco,

Agnoskante neceson plibonigi kompren-
iĝon kaj komunikadon inter la popoloj,

Ankaŭ agnoskante, ke ege gravas savi
lingvan kaj kulture heredaĉon de homaro
kaj favorigi disradiadon de ĉiu el la kulturoj
kaj lingvoj, kiu esprimas ĝin,

Konsiderante danĝeron hodiaŭ minac-
antan lingvan diversecon pro tutmondigo
de komunikado kaj emoj uzi ununuran
lingvon, kun riskoj marĝenigi de la aliaj
ĉeflingvoj de la mondo, eĉ malapero de
malpli ampleksaj lingvoj inkluzive regionaj
lingvoj,

Ankaŭ konsiderante, ke edukado de
junularo, ĉie en la mondo, implikas senton

al dialogo inter la kulturoj, fonto de reci-
prokaj tolero kaj respekto,

Krome konsiderante, ke notindaj pro-
greso fariĝis en la lastaj jardekoj per
lingvoscienco, sed ke ne sufiĉe enkalkuliĝis
eksterordinaraj kapabloj de la infanoj
reprodukti sonojn dum „sensperiodoj”,

Agnoskante, ke kapabloj de juna infano
integri fonetikon kaj gramatikon science
konfirmiĝis,

Konsiderante, ke tiuj kapabloj ebligas
akiri plejjuŝe realan, pasivan kaj aktivan
komunikkapablon en almenaŭ du kiaj ajn
lingvoj,

Konscia, ke demokratia aliro al scio
transiras per fluenco en pluraj lingvoj kaj ke
favorigi tian aliron al ĉiuj estas devo tiam,
kiam disvolviĝas en multaj landoj privata
multekosta kaj elitisma lingvoinstruado,

Klarvidante la rezoluciojn adoptitajn
favorajn al dulingva edukado en siaj 18-a
kaj 19-a kunsidoj (1974 kaj 1976),

Enkalkulante, la kreadon per plenum-
komitato en oktobro 1998, de la konsulta
komitato por lingva plurismo kaj plurlingva
instruado, kaj kreado far ĝenerala direktoro
en 1998, de lingvodivizio sine de edukad-
sektoro,

rekomendas al membro- ŝtatoj:

a) krei kondiĉojn pri kreado de socia,
intelekta kaj informada internaciskala
ĉirkaŭaĉo por favorigi plurlingvismon;

b) promocii tra plurlingva edukado
demokratian aliron al scio por ĉiuj civitanoj,
kiaj ajn estu ilia gepatra lingvo kaj konstrui
plurlingvismon; la strategioj ebligontaj
atingon de tiuj celoj povus enhavi:

1) frua akirado (infanĝardeno, unua-
grada lernejo) krom de gepatra lingvo,
de dua lingvo,

Universitata kurso en La Laguna

La Universitato de La Laguna ofertas por la
venonta akademia jaro 2000-2001 liberelektan
seminaron „Enkonduko al Esperanto kaj ĉi
ties kulturo”. La direktoro de la kurso estas
Prof. Alejandro López de Vergara Méndez
kaj ĝin subtenas la Fakultato de Filologio.
Ĝi komenciĝos venontan februaron kun tri
akademiaj kreditoj kaj tridek docentaj horoj.
La kurson partoprenos ESTO kun kelkaj prelegontoj
kiuj pritraktos diversajn temojn rilate al la
esperanta kulturo. La rilatoj inter Esperanto kaj
la Universitato de La Laguna, komenciĝis en
la jaro 1947 kiam Prof. Régulo gvidis la unuan
liberan esperanto kurson en la antikva Fakultato
de Filologio kaj Beletro de ĉi tiu universitato.
Por pliaj informoj vizitu la paĝon:
<[http://www.ull.es/docencia/ofertadocente/
credit/filologia/index.html](http://www.ull.es/docencia/ofertadocente/credit/filologia/index.html)>

Prof. Leandro Trujillo Casañas
Boletín de HEF liven@nexo.es
Interredaktore

2) plua lernado de tiu dua lingvo en la
bazlernejo laŭ alproksimiĝo, t. e. uzante
du lingvojn por akiri sciojn dum la tuta
lerneja kariero ĝis universitato,

3) intensa kaj transfaka lernado de
almenaŭ tria viva lingvo en la dua-
grada, tiamaniere ke lernofine la lern-
anto povos trilingve esprimiĝi — tio
devus konsistigi normalan amplekson
de praktikaj lingvaj scioj de la 21-a
jarcento,

4) evaluado de finstudaj diplomoj
cele favorigi regadon de de vivaj lin-
gvoj ebligontan interkomunikadon kaj
interkompreniĝon;

5) internacia interŝanĝo de duagradaj
instruistoj kaj profesoroj ofertanta al ili
leĝan kadron por instrui sian fakon en
alilandaj lernejoj uzante sian propran
lingvon kaj tiel ebligantaj al lernantoj
akiri sciojn kaj samtempe lingvon;

6) enkalkulo en edukado, profesia
formado kaj entreprenoj, de lingva
kompetenteco kiun enhavas regionaj,
minoritataj lingvoj tie, kie ili ekzistas,

HEJMA VORTARO REPRESITA

En la Tel-Aviva UK estis venditaj la lastaj
ekzempleroj de la unua eldono de „Hejma
vortaro”, aperinta en oktobro pasintjare. Dum
naŭ monatoj estis venditaj 703 ekzempleroj.
Sekve „Hejma vortaro” superis alian furoraĵon,
la ZEO-libron „Monumente pri Esperanto”, kies
debito en la unuaj naŭ monatoj post la apero
estis 644 ekz.

Por ke la populara libro estu konstante aĉet-
ebla, UEA represis senŝanĝe la unuan eldonon.
„Hejma vortaro” estas do daŭre havebla por la
prezo de 7,50 eŭroj.

Per ĝia vendado oni apogas la agadon de
Rondo Familia, kiu estas komisiono de UEA
por kunligi familiojn kies hejma lingvo estas
Esperanto.

CO de UEA
Interredaktore

devenaj lingvoj de la enmigrintoj;

7) disponigo al instruistoj kaj eduk-
aŭtoritatoj de informadika reto kaj
datenbazo faciligantaj interŝanĝojn de
informoj kaj spertoj;

8) starigi nacian kaj/aŭ regionan
komitaton studantan kaj ellaborantan
proponojn pri plurlingvismo por mal-
fermi necesan dialogon inter repres-
zentantoj de ĉiuj profesioj kaj fakoj.
Tio ebligas naski grandajn liniojn de
lingva edukado adaptata al ĉiuj landoj,
sed ankaŭ taŭga faciligi internacian
interkomunikadon samtempe zorgante
pri la riĉa kaj neforigebla lingva kaj
kultura heredaĉo de Homaro.

c) favorigi studadon de lingvoj de gran-
daj malnovaj kaj modernaj civilizoj por
savi kaj promocii literaturan instruadon;

**invitas la Ĝeneralan Direktoron
tagordigi tiun problemon por
konsulta komitato por lingva
plurismo kaj plurlingva instruado.**


EŬROPA JARO DE LINGVOJ

Konsilio de Eŭropo, en kiu membras preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj kiu estas konata pro sia okupiĝo pri homaj rajtoj, kaj Eŭropa Unio deklaris la jaron 2001 Eŭropa Jaro de Lingvoj.

La du eŭropaj organizaĵoj strebas progresigi instruadon de lingvoj kaj levi la konscion de la granda publiko pri la valoro de lingva plureco en Eŭropo. Krom vasta informkampanjo, uzanta specialajn simbolojn kaj frapfrazojn, oni organizos amason da eventoj sur ĉiuj niveloj: tut-eŭrope, plurlande, nacie kaj loke.

UEA subtenas la iniciaton de la eŭropaj organizaĵoj. La celoj de la Eŭropa Jaro de Lingvoj kongruas kun tiuj de la Esperantomovado, al kiu ĝi donos okazon diskonigi siajn lingvopolitikajn celojn. Eĉ se la Jaro formale celas nur la lingvojn „rekonitajn de la membroŝtatoj” ĝi ja ebligas partoprenon ankaŭ de Esperanto-organizaĵoj per projektoj kongruaj al la celoj de la Jaro. Krome oni povas antaŭvidi, ke ĵurnalistoj k.a. interesitoj ne limigos sin nur al la ŝtataj lingvoj sed povos interesiĝi ankaŭ pri la situacio de Esperanto kaj la perspektivoj por ĝia pli vasta uzo en Eŭropo.

La Jaro de Lingvoj prezentas ŝancon al agado por antaŭenigi la celojn de Kampanjo 2000, t.e. plialtigi la prestiĝon de la internacia lingvo. Influi la internacian vivon, kaj levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperantomovado. La Jaro ricevos atenton i.a. en la traktado de la kongresa temo de la Zagreba UK, „Kulturo de dialogo —



Dialogo inter kulturoj” kaj en la eldona agado de UEA, t.e. revuoj kaj libroj. Landaj asocioj devus atenti ĝin en siaj aranĝoj kaj eldonaĵoj, kaj klopedi kiel eble plej multe kunlabori kun ne-esperantistaj asocioj kaj fakuloj.

Por evoluigi ideojn pri la esperantista kontribuo al la Jaro, estas formiĝanta kunaganta grupo kiun kunordigas Anna RITAMÄKI:

adreso: Dragsfjärdsvägen 690
FI-25700 Kimito, Finnlando
rete: <anna.ritamaki@kolumbus.fi>
tel. +358-2-423146
fakso +358-2-423246

Oficialaj informoj troviĝas en interreto i.a. ĉe: <<http://eŭropa.eŭ.int/comm/education/languages/actions/year2001.html>> (anglalingva kun ligoj al alipaĝaj versioj) <<http://culture.coe.fr/infocentre/press/eng/2000/epress2000.04.03.html>> (gazetara komunikado de Konsilio de Eŭropo)

Gazetaraj komunikoj de UEA
Interredaktore

KRUCVORTENIGMO

1		2	3	4	5	6	7
	8						
9	10		11			12	
13		14		15	16		
17				18			
19					20		
21			22	23		24	
		25			26		
27							

Kromsolvo

3	24	7	1	17	6
---	----	---	---	----	---

Horizontale: 1. pekliberigon, 8. nia gefrata organizo, 9. insista adverbo, 11. adept', 12. numeralo, 13. senakv', 15. kod', 17. studo pri Dio, 19. fungosporĉela. 20. balancet' bebon por dormigi, 21. mallongigo de Nova Testamento, 22. kemia simbolo de niobo, 24. sur rumana aŭto, 25. spirita atmosfer', 27. entombigo.

Vertikale: 1. aserte, 2. refleksiva pronomo, 3. vicmontra numeralo, 4. tagmeza manĝo, 5. plenda interjekcio, 6. kemia simbolo de oksigeno, 7. informo pri ĵus mortinto, 10. partopren', 12. asteri', 14. maskla korta bird', 16. neĝdomet', 18. malrapide, 23. metaloida element', 25. malgrandiga sufikso, 26. kiel 2.

Kromsolvo: rita vesto.

Fritz LAUTENBACH

Solvo de la krucvorttenigmo en numero 822

horizontale: 1. difavoro, 7. ekin', 8. fi, 10. VN, 11. da, 12. edzo, 14. mot', 15. neonlumo, 17. san', 18. uter', 19. ir', 20. ek, 21. ni, 22. arto, 24. oficinoj.

vertikale: 1. defensivo, 2. Fe, 3. akvon, 4. vin', 5. on, 6. oratorioj, 9. idear', 11. domen', 13. zon', 14. mut', 16. lukti, 20. erc', 23. on.

kromsolvo: Filemon.

ĈE L' SINJORA FLANKO, NE EBLAS MANKO


En Psalmoj 23-a kaj 24-a, David rakontas pri l' valoro resti ĉe Dio. En la 23-a, li sciigas, ke, farante el Dio sian paŝtiston, oni ne havos mankon. Ne estas malfacile kompreni tion, ĉar en Psa 24:1, li diras ke la tero kaj ĉio kio plenigas ĝin apartenas al Dio. La Eternulo tion konfirmas: „*Se vi estas humilaj kaj obeemaj, vi manĝos la bonaĵon de la tero*” (Jes 1:19).

Kiel obei? Esti ĉe Li. Kiel esti humila? Respondi Lian alvokon: „*Venu kaj ni faru inter ni juĝan disputon*” (Jes 1:18).

Jesuo ankaŭ kontribuas, „*se vi restadas en mi kaj miaj vortoj restadas en vi, petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi*” (Joh 15:7). Oni obeas, restante en Kristo. Oni estas humila permesante Liajn vortojn restadi en si. Malrespekto al la vortoj signifas fierecon aŭ sendependecon.

Ni restadu ĉe la Sinjora flanko, por ke nin ne trafu manko.

Olúbünmi Gabriel Ōshó-DAVIES



REGULOJ DE ĜENTILECO RILATE AL BLINDULOJ

Blinda Usonano aperigis laŭ interreta vojo kelke da reguloj, kiuj garantiu pli da ĝentileco, kiam vidanto renkontas nevidanton.

1. Mi estas normala homo, escepte de mia blindeco. Vi ne bezonas plilaŭtigi vian voĉon aŭ alparoli min kvazaŭ mi estus infano. ne demandu al mia edzino, kion mi deziras („Ĉu li uzas lakton en la kafo?”), sed rekte demandu al mi.

2. Eble mi uzas longan bastonon aŭ gvidhondon por memstare moviĝi surstrate. Povas esti, ke mi petas vin preni min ĉe la brako. Sed permesu al mi mem fari decidon kaj bonvolu ne preni min ĉe la brako: mi povas preni la vian. Mi restos duonan paŝon malantaŭ vi, ĉar tiel mi povas pli taŭge anticipi trotuarajn randojn kaj ŝtupojn.

3. Mi deziras scii kiu troviĝas kun mi en la sama spaco. Se vi eniras, bonvolu alparoli min. Prezentu min al aliaj homoj, ankaŭ al infanoj, kaj diru al mi ĉu ĉeestas hundo aŭ kato.

4. La pordo de ĉambro, ŝranko aŭ aŭtomobilo, kiu duone malfermitas, estas tuja danĝero por mi.

5. Dum la manĝoj mi ne havas specialajn problemojn rilate al normalaj tablo-kutimoj.

6. Vi ne bezonas eviti vortojn kiel vidi.

Mi mem ankaŭ uzas ilin („Mi ĉiam ĝojas revidi vin!”).

7. Mi ne deziras kompaton, sed prefere ne parolu pri la belegaj kompensoj kiujn portus kun si blindeco. Mia flarsento, gusto, aŭdo kaj palposento nepre ne pliboniĝis post la blindiĝo. Mi pli intense uzas ilin kaj tiel mi per la sensoj pli bone informiĝas ol vi, tio estas ĉio.

8. Kiam mi gastas ĉe vi, bonvolu sciigi al mi, kie estas la necesejo, la banĉambro, la vestejo kaj la fenestro. Kaj kie mi povas trovi la lumŝaltilon. Mi same deziras scii, ĉu la lampoj funkcias jes aŭ ne.

9. Mi estas preta paroli kun vi pri mia blindeco, se vi interesiĝas pri ĝi, sed por mi ĝi estas malnova historio. Mi interesiĝas same multe pri aliaj aferoj kiel vi.

10. Ne konsideru min nur kiel blindulon. Mi ja estas

homo kiel vi, sed kiu hazarde estas blinda.

11. Vi ne parolu kvazaŭeŭfemisme pri mi kiel vidhandikapulo aŭ persono kun limigita okulfunkcio; simple kaj sincere nomu min blindulo, ĉar tio mi estas.

12. En multaj landoj la leĝo postulas, ke ŝoforoj haltu kiam ili ekvidas mian blankan palpbastonon etenditan. Ĝin rajtas uzi nur blinduloj.

Tradukis: Jacques TUINDER

